

# Sud-Rejna Kuriero

**Aŭgusto  
2014**

## Komuna inform-bulteno de **Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto**

**N°55**

Espace 110  
FR-68110 ILLZACH  
CCP 19684 F Strasbourg  
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel  
Postfach 178  
CH-4005 Basel  
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*

*Ĉi-tiu numero aperas iom pli malfrue ol kutime, en aŭgusto anstataŭ en julio.*

*Ni sukcesis organizi amikan tagon tra Mulhouse, meze de junio.*

*Niaj ĉefaj aktivaĵoj bone funkciis en lastaj monatoj. La verdaj fadenoj en la lastaj lundoj de monatoj ĉiam allogis partoprenantojn. Ni daŭrigos ilin en venonta septembro.*

*La partopreno de nia grupo en la manifestacio "Vivu via strato" preskaŭ ĉiu-dimanĉe matene estis sukcesa. Vi legos pri ĝi.*

*Informoj pri Montevideo, kie okazis ILEI-konferencoj kun rememoroj pri la Unesko-deklaro en 1954.*

*Jen ankaŭ invito portopreni la komunan aranĝon de Bavelo kaj EFE en Sankt-Peter en oktobro.*



Atentu pro la nazuoj, kiuj abundas en la arbaroj de Iguasuo. Ili povas danĝere mordi. Prefere ne karesu ilin.

*André Grossmann*

Lunde	29.9.2014	Saint-Louis Babilado „La Faden“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	23.10.2014	Monata kunveno en Riehenring 131 Babilado kaj ludoj
Lunde	24.11.2014	Saint-Louis Babilado „La Faden“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	27.11.2014	Programo en Riehenring 131 Ek de la 20a15
Sabate	13.12.2014	Zamenhofa festo en Svislando kun ebleco viziti la laboratorion Novartis

Nicole Béroud

## Fußball-Freundschaftsspiel Esperanto- Armenien

Noch bis zum 2. August findet in Buenos Aires, Argentinien, aktuell der 99. Esperanto-Weltkongress statt. Ungewöhnlichster Programmpunkt der Veranstaltung ist vermutlich ein Fußball-Freundschaftsspiel zwischen einer Esperanto-Mannschaft und einer Mannschaft der Armenischen Gemeinde in Argentinien. Das Esperanto-Team wird aus einer Auswahl von Kongressteilnehmern zusammengestellt, um die weltweite Esperanto-Bewegung zu vertreten.

Schirmherren des Spiels sind das Ministerium für Sport der Regierung in Buenos Aires sowie CSANF, eine Vertretung von Fußball-Landesverbänden in Südamerika, die nicht FIFA-Mitglied sind. Diese organisieren u.a. regelmäßig ihre eigene, alternative Fußball-Weltmeisterschaft. CSANF hat auch ein offizielles Plakat für die anstehende Partie erstellt und macht damit Werbung auf Facebook.

Das Spiel wird am Donnerstag, dem 31. Juli, im "Polideportivo Cole-

giales" in Buenos Aires ausgetragen. Als Preis für die Siegermannschaft winkt ein "Pokal der Internationalen Freundschaft".

(Quelle: Gezataraj Komunikoj de UEA)

Nachtrag 03.08.2014:  
Die Auswahl für Esperanto bestand aus 20 Personen. Den größten Anteil bildeten Mitspieler aus Argentinien, weitere Spieler kamen u.a. aus Brasilien, Kolumbien, der Demokratischen Republik Kongo, Kuba, Nicaragua und Russland. Das Spiel endete 8:3 für die Armenische Auswahl.



## Pri "krokodiloj" kaj "krokodili"



En la tridekaj jaroj, unu el la kafejoj [de la "passage Choiseul", en la dua distrikto de Parizo] estis la ĉiumonata rendevuejo de la Pariza Esperanto-Grupo. Kial ĝuste tiu kafejo? Pro tio, ke la kelnero, iu Ferrari, estis esperantisto. (. . .) Li ne estis tre sperta esperantisto, tiel ke Raymond Schwartz diris iam pri li, kun sia kutima humuro: "Kelkfoje Ferrari. . povas erari".

Sed Ferrari estis tre fervora esperantisto, eĉ iom fanatika. Kiam iu el la kunvenantoj, pro pigreco, parolis ne plu esperante, sed france, la brava kelnero grumblis: "kia sovaĝulo! kia krokodilo!" ĉar li konsideris, ke paroli nacilingve en esperantista rondo estas ago de sovaĝulo. Kaj en lia buŝo, la vorto "krokodilo" signifis sovaĝan beston, sovaĝulon.

La uzado de tiu vorto amuzis la grupanojn, kiuj rapide ŝanĝis ĝin al verbo: li krokodilas, ni krokodilas, ktp. Tiel la esperantista leksiko pliriĉiĝis je unu verbo: "krokodili - paroli nacilingve en medio Esperantista aŭ (vasta-sence) internacia".

(laŭ artikolo de André Cherpillod en Heroldo de Esperanto)

## Amika tago tra Mulhouse kaj komuna manĝo por nia grupo la 14an de junio 2014

Jacques Pineda iniciatis la organizadon de tiu "Amika tago" unufoje tra Mulhouse por la 14a de junio. Tamen en tiu tago okazis striko ĉe la franca fervojo. Tio estis maloportuna situacio por la partoprenantoj, kiuj planis alveni per trajno.

Je la 10a15 ni estis 4-ope en la stacidomo de Miluzo, sed neniu plu alvenis. Finfine ni tamen decidis ekmigradi laŭ la planoj de Jacques. La vetero estis agrabla, ni ekpromenis laŭlonge de la kanalo for de la aŭtomobila trafiko. Fone vidiĝis la ponto kun piramida formo



Ni atingis la kvartalon "Fonderie", antaŭe fandejo-uzino de SACM. Nun ĝi estas nova universitato en Miluzo. Jacques aparte montris la grafiĉaĵojn ĉe "Porte du Miroir" "Pordo de la Spegulo", kiuj estis skribitaj en diversaj lingvoj, la ĉina, la araba, la alzaca. Grava memoraĵo de la tiama industrio en la urbo.







Poste ni atingis la bazaron ĉe la kovrita kanalo, kie abunde svarmis la homoj. Jacques klarigis la originon de la diversaj kvartaloj, kiujn ni tra-iradis. Nia celo estis: atingi la restoracion ĉirkaŭ la 12a, kun la espero, ke ceteraj partoprenantoj rendevuas tie.

Efektive en la restoracio jam estis alvenintaj niaj germanaj amikoj kaj ceteraj partoprenantoj, kiuj planis nur la tagmanĝon de nia grupo. Ĉar ĝi ja estis ankaŭ la jar-fina manĝo de nia grupo.

La nombro da kunmanĝantoj estis preskaŭ atingita, kio estis iom la zorgo de Jacques. Krome ni eksciiis, kial iuj ne sukcesis atingi la stacidomon.

Ne plu gravas, ni kune ĝuas la renkontiĝon ĉirkaŭ aperitivo.

La estrino de la restoracio "Le Printemps" pretigis por la partoprenantoj de tiu amika tago tre belan paeljon.



Jacques pretigis etan kvizon rilate la historion de la Esperanto-movado. La ĉefa premio estis glaso kun surskribo de la urbo Mulhouse.

Ĝin gajnis Edmond, kiu volonte ĝin transdonis al Ginette Martin, por danki ŝin pri ŝiaj multaj agadoj, rilate al Esperanto kaj ties movado.



Post la manĝo, Jacques gvidis la grupon al la urbo-centro, unue ĉe la turo Bollwerk. De tie ni promenis al placo de la "Réunion", kie ni havis la eblecon senpage viziti la historian muzeon.



La art-muzeo estis survoje al la stacidomo, tial eblis ankaŭ ĝin viziti.

Por atingi Frajburgon ne plu funkciis trajno, tial necesis uzi aŭtobuson.

Malgraŭ kelkaj problemetoj pro fervoja striko, nia amika tago estis sukcesa kaj ni refoje ĝuis internacian amikan etoson.

fotoj kaj teksto de Andreo



**ILEI-konferencoj  
okazis en Montevideo  
de la 18a ĝis la 25a  
de julio 2014**

**ILEI estis akceptita de la  
urbestrino de Montevi-  
deo, en la Nacia Parla-  
mentejo**

En impona ital-stila palaco, longa, vasta salonego kun marmoraj kolonoj, altega plafono kun koloraj vitraj fenestroj -- jen la ejo de la Ĝenerala Kunsido de Unesko en novembro-decembro, 1954. Tiu salonego okupas la tutan larĝon de la 'Leĝa Palaco', la duĉambra parlamentejo de Urugvajo.




En tuj apuda, same impona salono ariĝis naŭdeko da anoj de la 47a Konferenco de ILEI plus gastoj kaj lokaj helpantoj. La prezidantino de ILEI, s-ino Mirejo Grosjean bonvenigis la konferencanojn, prezentis la podianojn kaj honorajn gastojn. Elstare inter tiuj estis la urbestrino de Montevideo, s-ino Ana Olivera. Plie du reprezentantoj de la Regiona Oficejo de Unesko en Montevideo, inter kiuj la direktoro, s-ino Lidia Brito. Krome la Vic-ambasadoro de Svislando en Urugvajo.

La urbestrino deziris al ni sukcesan kunvenadon kaj kore bonvenigis nin al Montevideo, ĉefurbo kun 1,4 milionoj da loĝantoj. Ŝi montris klaran simpatian por nia lingvo, klarigante, ke ŝi ekkonis ĝin jam en junaĝo, ĉar tre influa lernejestrino de ŝia liceo deklaris: "Estus bone, se estus komuna lingvo, uzebla por ĉiuj personoj".

La direktorino de la Unesko-oficejo (kiu zorgas pri scienco tra la tuta Sud-



Ameriko kaj Karibio, kaj prizorgas ĉion de Unesko en Urugvajo, Paragvajo kaj Argentino) emfazis la edukajn laborojn de Unesko kaj la grandecon de la problemoj de malegaleco, malriĉeco kaj malpaco, kiun eblas superi nur per pli fortaj programoj kaj klopodoj. Ŝi bone sentis la lingvan dimension en la evolulaboroj kaj konsentis, ke Unesko kaj la Esperanta movado dividas mult-



tajn komunajn valorojn.

Interese, ke nur en nia konferenco, la direktorino de la Unesko-oficejo en Montevideo unuafoje renkontis kaj kore salutis sian urbeŝtrikon.

Poste la vicprezidanto de UEA en sia saluto diris la sekvon: Nome de Universala Esperanto-Asocio mi kore

dankas al la reprezentantoj de Urugvajo, de Montevideo, de Unesko kaj la diplomatoj pro la partopreno en nia solenaĵo kaj pro la digna kaj impona akcepto kiun ricevis la Konferenco de niaj instruistoj.

La rekono de Unesko al la lingvo Esperanto antaŭ 60 jaroj ludis difinan rolon en la historio de nia lingvo. Ni refoje emfazas, ke temas pri vivanta, funkcia lingvo kun aktiva tutmonda parolkomunumo.

La lingvo kapablas ludi valoran rolon en interkulturaj kontaktoj; ĝi ne nur havas propran kulturon, ĝi plie efike servas kiel ponto inter plej diversaj kulturoj, kaj farante tion, kontribuas al la protektado de multlingveco en la mondo.

Dum nia Konferenco ni certe diskutos tiujn temojn. Nome de UEA mi deziras al ĝi plenan sukceson.

Tradukadon kapable faris tra la tuto Ana Montesinos de Gomis kaj Duncan Char-







ters. La disponigo de la nacia parlamento kaj al altiro de tiom altrangaj gastoj estas la merito de la loka konferenca teamo, sub gvido de s-ino Sonia Risso. Antaŭ la pluiro al du dudek-minutaj pritemaj prelegoj farotaj nur en Esperanto, la honoraj gastoj ricevis inviton forlasi la salonon, kaze de aliaj devoj. Laŭdinde, ili ĉiuj restis, kaj laŭ la reagoj, evidente komprenis kaj aprezis multon.

Unue, Marija Jerković el Kroatio prizorgis lumbildan prezenton pri la preparlaboroj ekde la 7a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo en 1952, por veni al la punkto povi en Montevideo du jarojn poste akceptigi kunlaborajn rilatojn inter UEA kaj Unesko. Tio frue sukcesis, sed favora rezolucio pruviĝis pli defia. Necesis unue trovi subtenan delegacion. Post multa laboro, la meksika delegacio konsentis prezenti proponon, sed ĝi estis malakceptita, ĉefe pro la detrua kaj moka interveno de prof. Blinkenberg el Danlando, kiu i.a. aludis negative al urugvajaj menuoj. En tri-minuta reaga interveno, malfacilis restarigi seriozecon kaj favore prezenti Esperanton. Tio ŝajnis la fino. Sed ne. La loka helpa teamo laboregis, ĉiutage aperigis en la urugvajaj ĵurnaloj artikolojn favore al Esperanto, tiel ke la malakceptita rezolucio fariĝis nacia diskutpunkto. Lapenna mem donis radian intervjuon, persiste lobiis inter la delegacioj kaj aranĝis kunsidojn kun altranguloj. La lumbilda prezentaĵo donis, tra la lastaj tagoj antaŭ la konferenca fermo laŭhoran, poste laŭminutan resumon de la rimarkindaj eventoj kaj atingoj, kiuj kulminis en eksterordinara revoĉ-donigo de la rezolucio en la fina ĝenerala asembleo, kun bele pozitiva rezulto.

La dua prelego provis doni pli vastan kuntekston al tiuj dramecaj momentoj. Mirejo Grosjean skizis la decidajn mejlo-ŝtonojn de Esperanto ekde 1859 ĝis la nuntempo, en kiu 1954 evidente ludas grandan rolon. Ŝi tion klare kaj elokvente prezentis, fine tirante el la historio kaj de la ag-principoj de Lapenna mem, receptojn por nia estonta agado, interalie ĉe Unesko.



Post tiu duhora solenaĵo, la konferenco ricevis gviditan montradon de la parlamentejo, inkluzive de la imponaj kunvenejoj por la 99 deputitoj kaj la 33 senatanoj. Tuj ekstere de la palaca placo, sur herbejo apud trafikata avenuo, la konferenco rajtis kolektive planti gujavan arbeton, kiun esperantista ekologio jam kreskigis el semo. Antaŭ la arbo estis solene malkovrita digna ŝtonplako kun teksto: 'Esperanto kaj Unesco – ligitaj tra sesdek jaroj – 1954-2014.'



Memorinda mateno por ILEI kaj por Esperanto entute.

Stefan MacGill (UEA) kaj Mirejo Grosjean (ILEI)

Tekston pretigis SMG laŭ komiŝio de Mirejo Grosjean.

# Mateo en Urugvajo

Mateo estas speco de infuzata trinkaĵo farita el matea herbo, kutime konsumata varma, speciale populara en Sud-Ameriko. Mateo enhavas stimiligajn substancojn, kafeinon kaj kelkajn aliajn. Mateo estas agnoskata kiel pli milda stimulgiga trinkaĵo, ol kafo aŭ teo, sed seriozaj esploroj pri la temo ankoraŭ ne estis faritaj.

En Urugvajo furoras la trinkado de Mateo, ne nur en la hejmoj sed ankaŭ surstrate.

Jen vendisto proponas la necesan materialon: termobotelo, mateujo kaj suĉilo, krome eblas akiri taŭgan sakon por transporti la tuton.


En la mateujon estas metita matea herbo, oni verŝas sur ĝin varman akvon. Per la suĉilo eblas trinki la mateon. Post la unua trinkado, eble iom amara, oni verŝas denove varman akvon kaj suĉe trinkas ĝin, kaj tiel eĉ plurfoje.



En urboj, surstrate, en parkoj eblas vidi homojn, okupataj por trinki mateon, jen gejunuloj kaj maljunuloj. Eĉ taksi-ŝaforoj havas je dispono sian mateujon.

Ĉu drogo? ĉu ĝi kaŭzas dependencon?

En Argentino, la mateujoj estas ofte pli grandaj kaj ŝajne malpli da konsumantoj surstrate.



Fotoj de Andreo



## "Vivu via strato" dum 10 dimanĉoj en Mulhouse

*Jam okazis la sesa vitarue-festo. Dek dimanĉoj da aktivaĵoj, renkontoj, plezuroj. Ekde la 25a de majo, ĝis la 27a de julio, 120 volontuloj akceptis la vizitantojn por ludaj, agrablaj, tonikaj, kuiraj, sportemaj, kulturaj dimanĉoj. Kelkaj esperantistoj (Andreo, jacques, Bertrand, Ivo, Anne) deĵoris, ne ĉiujn dimanĉojn, sed preskaŭ. Estis la okazo por konigi nian pasion ĉe multaj, diversaj publikoj. Tie oni konfrontis niajn certecojn kun aliaj opinioj. Tio estas tre interesa sperto! Tagmeze sekvis pikniko sur herbejo, dume okazis diversaj spektakloj (se la vetero tion ebligis).  
Rendevuo en la venonta jaro?*

Ivo

Deĵori ĉe "VITARUE" estas agrablega afero, ĉefe kiam pluvo forestas. Tie la homoj serĉas ligan kun la naturo per iliaj aktivaĵoj, per praktiko de sana kuirado ili montras vojon al natureca vivmaniero. Per ludemaj interrilatoj ili alproksimiĝas al alternativa kunvivado. Sed malfacilas priskribi la tuton, venontjare vi nepre devas ĉeesti, por mem ĝui la etoson.

Ankaŭ pri la funkciado oni povus mediti: ĉar "VITARUE" oficiale ne estas asocio, la anoj tie estas interligitaj per komuna celo kaj agado. Oni diris al mi, ke ĉiujare dum-aŭtune la anaro kunvenas por ree difini la celojn kaj agadojn. La organizantoj de tiu iniciato simpatias kun ni kaj kelkfoje eĉ nin akceptas per varma esperanta "Saluton" aŭ "Bonan tagon".

Pri nia partopreno, unuavide la rezultoj pozitivas, ĉar la intereso pri la internacia lingvo ŝajnas sincera kaj scivolema. Kelkaj vizitantoj miras, ke Esperanto ankorau ekzistas, aliaj konas aŭ iam konis esperantiston, iuj eĉ iom eklernis. Virino el Kaŭnas, Litovio, kiu nun de ok jaroj loĝas en Mulhouse, estis membro de la E-klubo en sia devena urbo. Ni kuraĝigis ŝin nun membriĝi ĉiloke. Laŭ iniciato de Anne, ni ankaŭ kolektis kelkajn retadresojn. Kompreneble ni ĉiam parolis pri la lokaj lerneblecoj en Espace 110 kaj eble en Maison du Temps Libre. Ankaŭ ni menciis pri verŝajnaj informvesperoj. Kaj nun ek...!

Ĉar "VITARUE" disvolviĝas en verdejo, eble el ĝi iam elkreskas multaj verduloj.

Ni ja esperu...



Teksto kaj fotoj de Bertrand



## Mesaĝo ricevita

*Li nomiĝis DEZIRATA, kaj estis malriĉa skota farmisto. Iam pene laboranta por sia familio, li aŭdis help-alvokon el proksima marĉo. Li lasis siajn ilojn, tien kuris kaj trovis junan knabon sikinta en la marĉon ĝis la talio, timanta, krianta kaj provanta sin liberigi. La farmisto savis la junulon de supozeble malrapida kaj kruela morto.*

*La postan tagon eleganta jungitaro alvenis al la farmo. Nobelulo elegante vestista eliris kaj prezentis sin kiel la patro de la knabo, kiun la farmisto savis.*

- mi deziras rekompenci vin, diris la nobelulo. Vi savis mian filon.
- Mi ne povas akcepti pagon por la farita ago, respondis la skota farmisto.

*Sammomente, venis al la pordo de la kabano la filo de la farmisto.*

- Ĉu li estas via filo? demandis la nobelulo.

- Jes, fiere respondis la farmisto.

- Tiam mi proponas al vi jenan oferton. Permesu al mi donaci al via filo la saman instruadon, kiel al mia filo. Se la filo similas al la patro, mi certas, ke li estos homo, pri kiu ni ambaŭ fieros.

*La farmisto akceptis. La filo de la farmisto Fleming sekvis la kursojn de la plej bonaj lernejoj kaj ĉe la fino estis diplomita de la Medicina lernejo de la hospitalo Sankta Maria de Londono. Havanta grandan celadon, li daŭrigis kaj fariĝis famekonata en la tuta mondo. La fama doktoro Alexander Fleming efektive malkovris penicilinon.*



*Jarojn poste la filo de la nobelulo, kiu estis savita el la marĉo, suferis pro pneŭmonio.*

*Kiu ĉi-foje savis lian vivon? Penicilinon.*

*Kiel nomiĝis la nobelulo? S-ro Randolph Churchill kaj lia filo, s-ro Winston Churchill.*

*Iam iu diris: Ĉio, kio foriras, revenas... "Laboru kvazaŭ vi ne bezonas monon, Amu kvazaŭ vi neniam vundiĝis. Dancu kvazaŭ neniu rigardas vin. Kantu kvazaŭ neniu aŭskultas vin.*

# Sporto, mono, politiko kaj. . .Esperanto

En 2014 sporto estos kolektinta tra la mondo centojn de milionoj da spektantoj en la sportejoj kaj antaŭ la televid-ekranoj. Feliĉa afero kaj belega festo por la homaro ĉar plibone alfrontiĝi sur stadionoj ol sur bal-talkampoj.

Cetere ni ĉiuj scias, ke sporto virto-plenas por korpo menso kaj socialaj rilatoj. Bedaŭrinde, la realeco ne ĉiam spegulas la belajn olimpiajn devizojn.

La moderna sporta konkurado regule resendas al ni imagojn de perforto tromp-ludadoj malhonesteco flanke de la ludantoj kaj klubestra-roj kaj flanke de la spektantoj, spektaĵon de stultaj frenezuloj, kiuj vizitadas la sportejoj por bleki, hurladi, morkrii, insulti kaj kelkefoje drame alfrontiĝi. Certe tiu malgaja konstato koncernas precipe amas-sportojn kaj aparte piedpilkon, sed ĝuste ĉar ĝi trafas la plimultegon ĝi malbriligas la kulturan kaj edukon valoron de la sporto.

Kio respondecas? Sendube mono kaj politiko.

Mono subfosas la sportan mondon. La jaraj "bazaroj", hontaj ejoj kie aĉetiĝas kaj vendiĝas la ludantoj laŭ la merkata leĝo kaj kie la plej riĉaj kluboj (plejparte deficitaj) elaĉetas la plej bonajn ludantojn, falsas la regulojn de la sporta konkurado. Tio estigas stelulojn, kiuj revigas la junulojn, sed kiuj samtempe forigas ilin de la realeco kaj precipe de la sporta spirito.

Alia ekzemplo: la gigantaj kaj ĉiam kreskantaj monsumoj englutitaj en la organizado de la olimpiaj ludoj, vera super-oferto, kiu ruinigas la malriĉajn landojn.

Pri la politiko, nenio ŝanĝiĝis ekde la naziaj olimpiaj ludoj de 1936 (ekcepte la rasisma konduto de la ŝtatestro) ĉar ĝi daŭre ĉeestas la stadionojn. Tiel la naciaj standardoj kaj himnoj paroksimigas la politikajn venĝo-sentojn de la spektantoj (konkurado pri naciaj regionaj rasistaj kaj eĉ religiaj problemoj) Kion fari? Sporto, socia fenomeno, nature spegulas nian socion. Do ni atendas, ke ĝi ŝanĝiĝos, sed atendante oni povus almenaŭ forigi de la sportejoj la naciajn himnojn kaj anstataŭigi ilin per internacia himno je la gloro de sporto, kantota nature en Esperanto.

Tiam eble venos kaj iros tra la stadionoj nova sento kaj forta vento de frateco. . . . . hodiaŭ ni multe bezonas ĝin.

Jacques Pineda



# 76a regiona staĝo de

esperanto

France-Est



36-a BAVELO-  
Seminario

17 - 19 Oktobro 2014  
Domo Maria Linden-  
berg, Sankt Peter

La monto Lindenberg estas unu el la grandaj fortolokoj en la Nigra Arbaro. Super la valo Dreisamtal oni rigardas al la monto Feldberg kaj al la vere altaj montoj en la Suda Nigra Arbaro. En la okcidento - se oni bonŝancas - oni vidas la vozezojn. Tiu ĉi loko kiel neniu alia invitas al konsciiĝo, al retrorigardo al la tempo de antaŭ 100 jaroj, kiam komenciĝis la Unua Mondmilito. Kadre de diversstemaj prelegoj Ed Borsboom, Bernhard Eichkorn kaj Edmond Ludwig per tralupea rigardo al la sorto de unuopaj homoj alproksimigos al ni la tiamajn okazaĵojn.

Aldone al tio la pejzaĝo de la natura parko Suda Nigra Arbaro instigas, portempe sin liberigi de la ĉiutagaj rapideco kaj premo kaj de la bruo de la urboj. Eblecoj por ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo kaj al la lago Titisee subtenos tion.

## Wallfahrtskirche Maria Lindenberg

Kiel kutime ni ne neglektos la lingvan flankon. Krom la "klasikaj" kursoj por komencantoj kaj progresintoj ankaŭ ĉi-foje estos paroliga kurso kaj la prelegoj de la t.n. bukeda kurso. En internacia etoso kun multaj partoprenantoj el najbaraj landoj el lingvolernado rapide fariĝas lingva travivaĵo. Kompletigos la aranĝon instiga vespera programo.



Foto Sankt Peter: Wikimedia Commons

Foto Pilgrima Preĝejo Maria Lindenberg: Joergens.mi/Wikipedia, permesilo CC-BY-SA-3.0 (de)

# Programo de la BAVELO-Seminario 2014

## Kursoj kaj petataj prelegantoj

- A - Kurso por komencantoj 1 (Frank Vogler)
- B - Kurso por komencantoj 2 (Johannes Mueller)
- C - Paroliga Kurso - Konversacio/diskutado pri interesaj temoj (Edmilson Lima Serejo)
- D - Bukeda Kurso por progresintoj kaj spertaj parolantoj; celataj temoj:
  - 100 jarojn post la "Granda Milito" (Ed Borsboom)
  - Max Josef Metzger - Kiel la milito faris el li pacaktiviston (Bernhard Eichkorn)
  - Kiel vilaĝo disŝiriĝis pro la milito (Edmond Ludwig)
  - Kiel akvo de'l rivero - La verkisto Raymond Schwartz (Edmond Ludwig)
  - Novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias)
  - Retrorigardo al la pasinta jaro per bildoj (Ursula Niesert)

## Turisma programo, i.a.

- (A1) Promenado al St. Peter (pitoreska vojo, ĉ. 3 km) AŬ
- (A2) Vizito ĉe unu el la multaj abelistoj de la regiono; poste komune gvidado tra St. Peter kun Bernhard Eichkorn.
- (B) Ekskurso al la lago Titisee.

## Horaro

### Vendredo, 17-a de oktobro

- 15:00 - 15:30 Alvojaĝo de frualvenantoj
- 15:30 - 17:00 Ekskurso por frualvenintoj
- 17:00 - 18:00 Alveno, akcepto, distribuado de ĉambroj, pliaj informoj
- 18:00 - 19:00 Bonveno kaj vespermanĝo
- 19:00 - 20:00 Kursoj - parto 1
- ekde 20:15 Vespera programo (interkonatiĝo, filmo) poste trinkejo ("knajpo")

### Sabato, 18-a de oktobro

- 07:30 - 08:30 Matenmanĝo

- 09:00 - 10:15 Kursoj - parto 2
- 10:30 - 11:45 Kursoj - parto 3
- 12:00 - 13:00 Tagmanĝo
- 14:00 - 17:00 Ekskursoj (St. Peter, lago Titisee, vidu supre)
- 17:00 - 18:00 Citro-koncerto (planata)
- 18:00 - 19:00 Vespermanĝo
- 19:00 - 20:15 Kursoj - parto 4
- ekde 20:15 Muzika vespera programo poste trinkejo ("knajpo")

### Dimanĉo, 19-a de oktobro

- 07:30 - 08:30 Matenmanĝo
- 08:00 - 09:00 Diservo (Bernhard Eichkorn)
- 08:30 - 09:30 Forlasado de la ĉambroj
- 09:30 - 10:30 Kursoj - parto 5
- 10:30 - 11:30 Kursoj - parto 6
- 12:00 - 13:30 Tagmanĝo, adiaŭo

Sankt Peter estas vilaĝo en la natura parko Suda Nigra Arbaro (Südschwarzwald), ĉ. 20 km oriente de Freiburg. La seminario okazos en la Domo Maria Lindenberg, seminariejo kaj ripozejo de la diocezo Freiburg, situanta iom ekstere de la vilaĝo.

Haus Maria Lindenberg ((vidu pli malsupre ĉe Alvojaĝo)  
Lindenbergstraße 25  
79271 Sankt Peter  
Tel: 0 76 61 / 9 30 00  
Fax: 0 76 61 / 93 00 33

### Alvojaĝo per trajno:

Veturu ĝis la ĉefstacidomo de Freiburg, de tie per buso tra Glottertal al St. Peter. Alternative per trajno al Kirchzarten, post per buso al St. Peter.

### Alvojaĝo per aŭto:

Sur aŭtoŝoseo A5 (Frankfurto-Bazelo), elirejo Freiburg Nord. Tra Glottertal al St. Peter, de tie restas ankoraŭ ĉ. 3 km ĝis Lindenberg (simple sekvu la ŝildojn).

La mapo montras la pozicion de gastejo sur la monto Lindenberg - Domo Maria Lindenberg estas najbara konstruaĵo samloka.

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas. La aliĝo validas post alveno de mono:

Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM ret-adreso:andreo.ag08@free.fr

### Aliĝilon bonvolu sendi al:

**S-ino Inge SIMON,**  
**Brünner Str. 20**  
**DE-73431 AALEN**  
**Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.**  
**Simon@esperanto.de**





**Haus Maria Lindenberg**  
**Lindenbergstraße 25**  
**79271 Sankt Peter**

Telefono: 0 76 61 / 9 30 00  
 Telefakso: 0 76 61 / 93 00 33

**Kostoj:**

La aliĝkotizo estas 30 €  
 10 € por gejunuloj ne pli ol 26-jaraj.

Aldoniĝos laŭkaze la kostoj por tranoktado/manĝado en la seminariejo resp. por biletoj dum la ekskursoj.

Kostoj por du tagoj inkluzive de manĝado en la Domo Maria Lindenberg:

2 tranoktadoj  
 en dulita ĉambro: 100 €,  
 en unulita ĉambro 130 €.

**Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Sankt-Peter**

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
Adreso		
Telefono:		
Ret-adreso:		
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est		

**Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon**

A     B     C     D

**Mi / ni interesiĝas pri la programero por fru-alvenantoj:**  Jes     Ne

**Mi alvenos per aŭto**   
**per publikaj transportoj**

**Mi / ni volas tranokti en la Domo Maria Lindenberg**

en unulita ĉambro

en dulita ĉambro

**Manĝoj:**

**Mi / ni volas manĝi vegetare**

**Alergio kontraŭ**

**Sen manĝo**

Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe
matenmanĝo			
tagmanĝo			
vespermanĝo			

Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo : <http://esperanto-bw.de/seminario-eo> :

# Nia Kalendaro 2014

septembro 2014	23 - 30	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a. Ni kune decidis pri la horoj kaj tagoj.
	26	Prezentado de Esperanto por kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	29	Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis.
oktobro 2014	7 - 14 - 21 - 28	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	3 - 10 - 17 - 24	Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	27	verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse

## KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2015-2017

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivadojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono	Kolora ekzemplero
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	14 eŭroj
2016	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	
2017	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



IGUASUO en Argentino kaj en Brazilo

